



Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK


Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque.	Fr. 55,— bind
Leono de Flandrujo — Conscience	55,— »
La Viro el Francujo — Ivans	29,— »
Per Balono al la Poluso — Andrée	65,— »
Viktimoj — J. Baghy	30,— »
Verdaj Donkiĉotoj — J. Baghy	20,— »
Tra la Labirinto de la Gramatiko	45,— »
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor	10,— »
La Du Amatinoj — de Musset	7,50 »
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf	12,— »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,— »
Pallietter — F. Timmermans	35,— »
Dialogoj kaj Komeditoj — E. Dahl	3,75 »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,— »
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz.	18,— »
La Stranga Butiko — R. Schwartz	18,— »
Verdaj Donkiĉotoj — J. Baghy.	18,— »
Gaja Lernolibro (ilustrita)	15,— »
Examenopgaven	12,— »
Leerboek Dirksen — 2 deelen	18,— »
Blinda Rozo — H. Conscience	4,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,— »
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2,— »
Schidlof Zakwoordenboek	30,— »
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,— »
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,— »
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto	2,— »
INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2,00 fr.	
Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.	
Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.	
Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.	
Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj mar- koj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.	
Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.	
Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.	
Poŝtkartoj: por 10 po 1 ½	

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate



Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Gerard Debrouweré
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel.: 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.
Poŝtĉeko: 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
H. VAN DURME kaj aliaj.

EGAN DANKON NI ŜULDAS !

Kiam antaŭ pli ol unu jaro, la sanstato de nia bedaŭrata kaj neniam forgesbla Juul Karnas ĉiam pli kaj pli malboniĝis, kaj kiam liaj fortoj eĉ komencis iĝi nesufiĉaj por la malfacila kaj laciga laboro, kiun la redaktado de Fl. E. postulis de li, tiam, en tiu malgaja momento, Sro LODEMA tuj prezentis siajn fortojn kaj kapablojn por helpi la ĉefredaktoron Juul Karnas en lia peniga laboro.

Apenaŭ Sro Lodema estis komencinta sian helpan laboron, ke la malgaja novaĵo de la morto de Juul frapis nin ĉiujn kun teruro. La Redaktoro de Fl. E. estis mortinta ! Ofereme kaj sen iu kontraŭstaro, Sro Lodema tuj prenis sur sin la tutan redakcian laboron de nia Revuo. Dum preskaŭ unu jaro li senlace sin fordonis por ĝi, tage kaj nokte, en ĉiu momento libera, li laboris por Fl. E., kiun li kun fiero scipovis teni en la rango de la plej interesaj Esperanto-gazetoj. Liaj artikoloj « Leteroj al Amiko la Koko » estis ŝatataj kaj ĝuataj de ĉiu Esperantisto, precipe de la lingvokompetentuloj.

En la numero de Novembro, li skribis sian adiaŭan artikolon kiel ĉefredaktoro, sed ni konsolis nin per la penso, ke li restus ankoraŭ fidela kunlaboranto, kaj ke li ĉiumonate verus la tiom valorplenajn « Leterojn ». Sed!... Ni vidis nin seniluziigitaj en nia espero, kiam antaŭ kelkaj tagoj Sro Lodema sciigis al ni, ke li ne pli longe povus resti konstanta kunlaboranto de Fl. E., pro manko de tempo kaj aliaj personaj kialoj. Tiu novaĵo, kompreneble ne ĝojigis nin kaj ni ege bedaŭras lian decidon. Ni povas, sen troigo, deklari ke ni perdas en Sro Lodema, unu el niaj plej kompetentaj kaj plej interesaj Esperantistoj de Flandrujo.

La Estraro kaj la membroj de Fl. Ligo, kaj la nuna redaktoro de Fl. E. en la nomo de ĉiuj ĝiaj legantoj, kiel ankaŭ en sia propra nomo, esprimas tie-ĉi al Sro Lodema, la plej koran dankon pro la malfacila laboro de lia redaktoreco, kiun li dum pli ol unu jaro tiel ofereme kaj tiel talentplene prenis sur sin.

Ni tamen esperas ke nia amiko Sro Lodema ne estos tute perdita por nia movado, kaj ke ni de tempo al tempo povos ricevi artikolon de lia majstra plumo.

La Redaktoro,
C. Schroeyers.

Al la Flandraj Ligoj.

Dezirante al vi ĉion bonan por la ĵus komencinta jaro, mi samtempe elparolas la esperon, ke 1936 alportu multe da sukceso al nia movado. Tamen vi scias, ke tiu sukceso ne venos al ni, sed ke ni devas konstante labori por atingi ĝin.

Ne forgesu, ke la nuna jaro estas tre favora por la propagando pro la fakto, ke ni havas inter ni nian Rumanan samideanon, la Cseh-instruiston Jos. Ornstein. La diversaj grupoj devos uzi tiun unikan okazon. Kvankam Sro Ornstein ĉiutage instruas, li tamen volonte faros propagandparoladojn en diversaj urboj; tiel ofte kiel pro la tempo estas eble.

Kaj ankaŭ en alia rilato la ĉeesto de Sro Ornstein devas instigi nin al laboro. Ĉar, antaŭ ol veni ĉi-tien li ĉestis en la «verda» Nederlando, kaj krom tio li vojaĝis tra multaj diversaj Eŭropaj landoj. Ĉie li povis konstati la progresojn de la movado, kaj tial mi timas, ke Flandrujo faris ne tre bonan impreson.

Sed tio ne estas tiel grava, kiam li vidos dum sia restado la sindonnan laboron de ĉiuj Flandraj Esperantistoj. Ni ne devas toleri ke eksterlande oni konsideras nin kiel movadon, kiu ankoraŭ suferas pro la infanmalsanoj.

Nia kongreso alproksimiĝas. Ni akceptos diverslandanjn samideanojn. Kaj kiel ni pli bone povas akcepti ilin ol montrante la fruktojn de nia laboro? Ni duobligu do la nombron de ĉeestantoj de la pasinta jaro.

Ofte vi plendas, ke U. E. A. ne rekonas nin. Vi prave plendas. Sed antaŭ ĉio plifortigu vian nacian organizon. Se nia movado ne progresas, nur la anoj povas esti respondecaj kaj nur ili povas ŝanĝi tiun staton.

La fareda laboro estas ega. Ni komparu Flandrujon kun la aliaj landoj. Preskaŭ en ĉiuj landoj la radiostacioj disponigas tempon por la Esperantistaro. En ĉiuj landoj la ĵurnaloj kaj revuoj regule aperigas Esperanto-artikolojn. En ĉiuj landoj oni organizas propagandfestojn okaze de la memoro de la naskiĝtago de nia glora majstro Dro. Zamenhof. En Nederlando ĉiam la monato Septembro estas la «verda» monato, tute dediĉata al la propagando. Resume en ĉiuj landoj oni konstante propagandas kaj disvastigas Esperanton.

Kaj ĉe ni? La Esperantistoj mem donu la respondon.

La jaro 1937a havos por la tutmonda Esperantistaro specialan signifon. Ĉar tiam ni rememoros la fakton, ke antaŭ 50 jaroj la unua Esperanto-libro aperis. Kion ni tiam povos montri kiel nian laboron? Ĉu ni estos la lastaj en la vico de la landoj? Ĉu vi toleros, ke alilandanoj diru pri ni, ke ni nur diskutis, sed ne laboris?

Tion ni devas kaj povas malebligi. Ni havas ankoraŭ tutan jaron. Ni eluzu tiun tempon ĝis la lasta minuto, por ke ni povu elteni la komparon kun ĉiu alia lando.

Vi estas adeptoj de la Verda Stelo. Vi briligu ĝin ĉie kaj ĉiam.

La Prezidanto.

H. RAINSON.

Kial vi estas esperantisto?

Antaŭ ol veni en Belgujo, mi ofte aŭdis kun miro kaj bedaŭro pri la eta disvolviĝo de la Esperantomovado en via lando. Tial mi ĝojplene akceptis la inviton de via prezidanto, Sro Rainson, gvidi Cseh-kursojn en via lando. Tiu invito estis por mi ne nur ĝojiga, sed ankaŭ honoriga, ĉar mi sciis, ke mi estos la pioniro de la Csehmetodo en Belgujo.

Kaj mi jam spertis, ke tiu instrumetodo, kiu havas multegajn adeptojn en aliaj landoj, ankaŭ ĉi tie sukcesos.

Sed mi ankaŭ rimarkis ion alian. Supre mi skribis pri la disvolviĝo de la Belga Esperantomovado. Sed jam dum mia mallonga restado ĉi tie mi vidis, ke en Belgujo ne ekzistas Esperantomovado.

Ĉar, kio estas «movado»? Laŭ la «Plena Vortaro» la vorto signifas: «Tuto de la agado de iu organizo por atingi difinitan celon».

Do la unua kondiĉo por movado estas «agado». Kaj ĝuste la agado mankas, almenaŭ ĉe la plej granda parto de la Belgaj Esperantistoj; ĉu Flandraj aŭ Valonaj.

Eble vi estos malkontentaj, ĉar mi komencas per kritiko. Sed komprenu bone, mi ne intencas kritikigi, sed amike atentigi vin je grava manko en via organizo. Kaj mi opinias, ke mi scias ankaŭ la kaŭzon de tiu manko.

Ĉu vi bone komprenas, kion celas Esperanto? «Certe», vi diros, «plifaciligi la internaciajn rilatojn». Jes, ankaŭ tion ĝi celas.

Sed nia lingvo havas pli altan, pli belan celon. Ĝi volas esti la ilo por atingi pacon kaj fratecon inter la popoloj.

Vi sciu, ke Dro Zamenhof mem diris pri tio en sia kongresa parolado (1906): «Al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun internacia lingvo en si enhavas».

Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.

Tiu ĉi ideo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto kiam mi estis ankoraŭ malgranda infano.» —

Kaj mi opinias, ke ankaŭ nin povas instigi nur tiu interna ideo. Ĉar la praktika utileco verŝajne interesas nur tiujn inter vi, kiuj spertas ĝin ĉiutage.

Kiam ni rigardas Esperanton nur de ĝia flanko praktika, la propagando estas senutila.

Por ni povas esti tute agale, ĉu ekzemple iu komercisto uzas francan, germanan, anglan lingvon aŭ Esperanton por sia propagando.


Tiam sufiĉas por ni, ke ni scias la lingvon, kaj kapablas legi, paroli kaj korespondi. Sed instigo al propagando nur povas esti la konscio, ke ni laboras por la bono de la homaro. Kaj nur tiel la laboro estos fruktodona.

Mi spertis, ke oni ofte konsideras Esperanton kiel temppasigilon aŭ amuzajon. Tio estas ofendo de nia lingvo kaj al ties aŭtoro Dro Zamenhof.

Esperanto estu por ni la plej bela kaj alta idealo de nia vivo. Nur tiam ni laboros sukcese. Nur tiam ni havos la kuraĝon daŭrigi, ankaŭ kiam ni estas malhelpataj.

Mi promesas al vi ĉiuj, ke mi donos ĉiujn miajn fortojn por starigi veran Esperantomovadon en via lando, sed mi petas — ne, mi postulas de vi, ke ĉiuj kunlaboru por realigi tiun deziron.

JOS ORNSTEIN,
Cseh-Instruisto.



7a Flandra Kongreso Gent

30an KAJ 31an DE MAJO KAJ 1an DE
JUNIO 1936.

Mendojn kaj mendojn oni bonvolu fari je P. Ĉ. 1530-50 je nomo de Ach. De Maertelaere, Proveniersterstraat, 25, Gent. Korespondojn por la organiza komitato oni sendu al la adreso : Raapstraat, 82, Gent.

KVARA KOMUNIKO

Kotizo : 12 fr-oj,

Glumarkoj trikoloraj estas haveblaj po 6 fr. la 100.

PROVIZORA PROGRAMO


SABATON 30an DE MAJO.

- 14a. Malfermo de la akceptejo en restoracio « La Renommée », Sint-Baafspein, 3.
- 18a. Kunveno de la membroj de Flandra Esperanto Instituto, en la akceptejo.
- 18.30a. Kunveno de la Estraro de Flandra Ligo, en la akceptejo.
- 20a. Malfermo de la kongreso en la « Raadskelder » (la suba salonego de la Haloj, apud la Belfrido). Ballo, tombolo, (de nekonataj premioj — kiu volas partapreni kunportu ion), deklamoj, kantoj.

N. B. — Je la 19.30a. la akceptejo translokiĝos al la apuda « Raadskelder ».

DIMANĈON 31an. DE MAJO.

- 8a. Malfermo de la akceptejo. (La Renommée).
Diservoj kun Esperanta prediko :
- 8a. KATOLIKA en la kapelo de la Hoogstraat, 39 (Patroj Dominikanoj).
- 9a. PROTESTANTA, en la « Hervormde Kerk », Brabantdam.
- 8.45a. Vizito al la Belfrido (Belfort). Oni sin enskribigu.
- 10a. Kunveno de ĉiuj kongresanoj sur la Paradoplaco (Kouter).
- 10.15a. Sekvanta iro al la urbdomo.
- 10.45a. Fotografado ĉe la ŝtuparo de la urbdomo.
- 11a. Oficiala akcepto de la urbeŝtaro kaj vizito de la urbdomo.
- 12a. Jarkunsido de Flandra Ligo Esperantista. (Verŝajne en la Reĝa Urbeŝtaro).
- 13.30a. Festeno (kun Fandra folklorista surprizo) en la « Raadskelder ».
- 16a. Promenadetoj, kaj vizito al :
- a. Malgranda Beginejo.
 - b. Grafa Kastelo.
 - c. Sta. Bavo Preĝejo
 - d. Folkloro Muzeo.
- (Konigu vian preferon — la kongresanoj estos gvidataj grupe).
- 17a. Kunveno de F. U. K. E. en la saloneto de la Patroj Dominikanoj, Hoogstraat, 39.
- 20a. Esperantista festo en la « Raadskelder » — Ballo — Elektado de gvidantoj kaj gekorteganoj. — Disdono de premioj al la plej granda grupo kaj la plej granda eksterlanda karavano.



GENT. — Sta Bavo-abatejo, « Kapittelzaal »
kunsidejo de la abatoj kaj de la monaĥoj.

N. B. — Je la 10.30a. la akceptejo fermiĝos. — La alvenontoj sin prezentu en la koncerna ejo laŭ la horo.

LONDON 1an. DE JUNIO.

- 9a. Akurate, forveturo de la ŝipo ĉe la « Recollettenbrug » (ponto apud la Juĝejo).
- 9.15a. Ebleco surŝipiĝi ĉe la « Albertbrug » (apud St. Petrostacidomo) por tiuj kongresanoj kiuj volas deponi siajn valizojn en la pakajejon de la stacidomo.
- 11a. Alveno en Deurle. — Naĝado — promenado — societaj ludoj.
- 12.30a. Tagmanĝo.
- 14.30a. Reveturo de la ŝipo.
- 16.30a. Alveno ĉe la « Albertbrug ». Adiaŭo de la forvojaĝontoj. (Por la kongresanoj kiuj disponas pri pliaj 2 horoj ni povas aranĝi viziton al la Muzeo de Antikvaĵoj — Bonvolu sciigi). La aliaj reveturos ĝis la « Recollettenbrug » kaj grupe iros al la « Adiaŭa vespero » en la akceptejo « Le Renommée ». Surprizo por la unua kongresano, de ekster granda Gent, kiu sin prezentos en la akceptejo, kaj ankaŭ por tiu kiu restos ĝislaste.
- La Organiza Komitato insiste petas ke oni sciigu kiajn vizitojn oni volas partopreni.
- La kunveno de F. U. K. E. estas metita en la programo, kiel faka kunveno; ni estas pretaj ankaŭ menciigi pliajn, se ili okazos.

La Snurportantoj (De Stropdragere)

DE CHARLES DE COSTER

El la franca lingvo tradukis: Pol Varens.

En tiu tempo, Gent, la nobla, rifuzis pagi sian parton de la helpmono, kiun ĝia filo Karolo, imperiestro, demandis al ĝi. Ĝi ne kapablis, ĉar sekve de Karolo, ĝi ne plu havis monon. Tio estis granda krimo; li konkludis mem iri puni ĝin, ĉar la bastono de filo pli ol ĉio estas ĉagreniga sur la patrino dorso Franciskó, kun la longa nazo, lia malamiko invitis lin, pasi tra Franclando. Karolo faris tion, kaj anstataŭ esti enkarcerigata, li estis laŭ imperiestra maniero priŝtata kaj dorlotata. Estis alta kunsento inter princoj kunhelpi unu la alian kontraŭ la popoloj.

Karolo longtempe restis en Valenciennes ne montrante signon de ia kolero. Gent, lia patrino, vivis sen timo, kredante ke ĝia filo, la imperiestro, ĝin pardonus, ĉar aganta laŭ sia rajto. Karolo alvenis ĉe la muroj de la urbo kun kvar mil ĉevaloj. D'Albe lin akompanis, ankaŭ la princo de Oranĝo. La ordinara popolo kaj la malgrandaj metiistoj certe volus malhelpi tiun filan eniradon kaj armigi la okdek-mil virojn de la urbo kaj de la ĉirkaŭaĵo. La riĉaj burĝoj, nomitaj « hoogh-poorters » kontraŭstaris tion, timante la superregadon de la popolo. Tamen Gent certe povis forpeli sian filon kaj liajn kvar mil ĉevalojn. Sed ĝi amis lin, kaj ankaŭ la malgrandaj metiistoj reprenis fidon.

Ankaŭ Karolo amis ĝin, sed pro la mono, kiun li jam havis de ĝi en siaj monkestoĵ, kaj por tiu, kiun li ankoraŭ deziris.

Ekokupante la urbon, li ĉiuloke konstruigis militistajn restadejojn, kaj nokte kaj tage gardistaroj tramarŝis Gent'on. Poste li proklamis (en granda ornato) la punon de la urbo.

La plej eminentaj burĝoj devis, portante ŝnuron ĉirkaŭ la kolo, veni antaŭ lia trono, kaj pardonpeti. Li deklaris ke Gent estis kulpa pro la plej gravaj krimoj, kiuj estas mallojaleco, forrompado de l' traktatoj, malobeeco, ribelo kaj ofendo de l' majesteco. La imperiestro ankaŭ deklaris nuligi ĉiujn ajn privilegiojn, rajtojn, senpagrajtojn, kutimojn kaj uzadojn; deklarante ankaŭ por la estonteco, kvazaŭ li estis Dio, ke ekde nun liaj posteuloj, venantaj sur la trono, ĵurus nenion rekoni, escepte la « Karolan koncesion » pri servuteco kion li devigis akcepti al la urbo.

Li detruigis la abatejon de Sankta Bavo, konstruigante tie fortikaĵon, de kie li facile povis trabori per kuglegoj la bruston de sia patrino Gent.

Kiel malbona filo, kiu deziras heredi, li konfiskis ĉiujn bienojn de Gent, rentojn, domojn, artilerion, militmunicion. Opinie tie ke ĝi estis tro bone defendata, li ankaŭ detruigis la ruĝan Turon, la turon de « Paddenhoek », la « Braampoort », la « Steenpoort », la « Waalpoort », la « Ketelport », kaj multajn aliajn, kiuj estis prilaboritaj kaj skulptitaj kvazaŭ ŝtonaj juveloj. Kiam poste fremduloj venis en Gent, ili sin interdiris: — « Kiu estas tiu plata, malĝoja urbo, kies belecon oni laŭdis? » — Kaj tiuj de Gent respondis: — « Imperiestro Karolo forprenis la multkoston remparon de la urbo ». Kaj tion dirante, ili hontis kaj koleris. Kaj el la ruinaĵoj de la remparaj pordegoj, la imperiestro prenis la brikojn por sia fortikaĵo. — Li volis ke Gent iĝu malriĉa, ĉar tiamaniere ĝi ne povus levigi per sia laboro, industrio nek mono kontraŭ liaj multimaj intencoj; li do kondamnis ĝin pagi la rifuzitan parton de la helpmono de kvar cent mil guldenoj, oraj Karolusoj, kaj plie cent kvindek mil Karolusoj, unu fojon kaj ĉiujare kiel ĉiamdaŭra rento ankaŭ ses mil. Ĝi estis pruntedoninta al li monon: li devis pagi por tio renton de cent kvindek funtoj. Perforte li devigis ĝin, redoni la ŝuld-atestojn, kaj tiamaniere pagante sian ŝuldon, li efektive pliriĉigis.

Je multaj okazoj Gent estis aminta kaj helpinta lin, sed li trafis ĝin ĉe la brusto per ponardo, serĉante sangon, tial ke li ne trovis sufiĉe da lakto.

Poste li alrigardis Roelandt (elp. Ruland) la belan sonorilon, pendigis ĉe ĝia frapilo la viron, kiu estis sonoriganta alarme por alvoki la urbon kaj por defendi ĝian rajton. Li eĉ ne kompatis pri Roelandt, la lango de sia patrino, per kiu ŝi parolis al Flandrujo; Roelandt, la fiero sonorilo, kiu diris pri si mem:

« *Als men my slaet dan is 't brandt* »

» *Als men my luyt dan is 't storm in Vlaenderlandt.* »

« *Kiam mi frapas, tiam brulas* »

» *Kiam mi sonoras tiam ŝtormas en Flandrolando.* »

Opiniante ke lia patrino tro laŭte parolis, li forprenis la sonorilon. Kaj tiuj de la plata ĉirkaŭajlando diris ke Gent estis mortinta tial ke ĝia filo per pinĉtenilo eltiregis ĝian langon.

Fakto pripensinda!

La FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA aranĝis feston dum Kristnasko. Pli ol tricent personoj ĉeestis en bela salonego. Sur tuko ok metrojn longa nia Sano. John Terry pentris la vortojn « Slechts door Esperanto naar Vrede ». Oni komencis per « La Espero » ludita de ĉarma fraŭlino. Bedaŭrinde la ĉeestantaj esperantistoj ne kunkantis la himnon. Regis sfero ne de esperantista sed de flandra ĝojo. La infanprezentadoj estis belegaj, momente eĉ kortuŝaj. La infanoj rigardis per avidaj okuletoj la belajn donacojn kiuj kuŝis sur tableto antaŭ la podio kaj kiuj estis disdonotaj post la unua parto de la programo. Antaŭ la dua parto, la Prezidanto de F.L.E. S.ro Rainson el Mechelen, elparolis malgrandan paroladon pri la utilo de Esperanto laŭ internacia vidpunkto kaj insistis por ke la ĉeestantoj ankaŭ lernu nian karan lingvon, ne nur kiel amuzajon sed kiel pecon de sia estonta vivo, ĉar malrapide sed certe venkos Esperanto. Por ĉi tiu okazo akompanis lin S.ro Ornstein el Rumanujo, la Ĉseh-instruisto, kiu donos esperantajn kursojn en ses urboj laŭ la Ĉseh-metodo. Ankaŭ tiu-ĉi Sinjoro estis invitata paroli kelkajn vortojn esperantlingve. Volonte li faris tion. En klaraj vortoj li sciigas al ni ke li estas veninta ĉi tien kun la espero trovi nombron da esperantistoj, sed en tiu espero li estis seniluziigita.

Jam tri horojn li estis en la salonego kaj ĉio, kion oni prezentis ĝis nun estis en Flandra Lingvo, lingvo kiu li ne komprenas. Tiam li altiris la atenton pri kvin aliaj landoj, kiujn li travojaĝis en vera verda atmosfero. Li ne kaŝis sian malkontentecon pri la malbona progreso de Esperanto en Belgujo. « Vi ĉiuj », li diris, « aplaŭdis kiam mi venis sur ĉi tiu podio, eble vi aplaŭdos kiam mi forlasos ĝin. Mi ne demandas ke vi aplaŭdu sed mi volas nur atentigi vin pri la fakto ke vi devas lerni Esperanton en via propra intereso. Post tri monatoj mi venos en Antwerpen kaj ĉirkaŭaĵoj por okazigi Ĉseh-kursojn. Mi petas vian kunhelpon kaj mi ĵuras ke post unu jaro, Flandrujo verdiĝos ». Oni aplaŭdis...

Bedaŭrinde ĉi-tiuj vortoj ne estis komprenataj de la amaso. Ĉu ne estas karakteriza ke oni devas aŭdi ĉi tiujn vortojn el la buŝo de fremdulo? Ĉu estus vera ke ĉio, kio okazas en Belgujo jam ekzistis almenaŭ kvardek jarojn en aliaj landoj? Ĉu Pastro Stracke pravis, kiam siatempe li skribis la libron « Arm Vlaanderen »?

Karaj gelegantoj, ne estu tiel indiferentaj, insistu por ke viaj gemikoj (junaj kaj maljunaj) ĉeestu la Ĉseh-kursojn. Vi mem, kiuj jam verdiĝis, pliampleksigu viajn konojn, legu multe kaj montru al la mondo ke la tempo, pri kiu skribis Pastro Stracke, estas for. Multaj flandraj gepatroj insistas por ke iliaj infanoj eklernu la

francean lingvon, kies gramatiko estas pli malfacila kaj kiun oni povas uzi nur en la suda parto de Eŭropo. Ne forgesu (la faktoj konstatas) ke per Esperanto oni povos traveturi la tutan mondon kaj korespondi kun *ĉiuj* landoj. Ne forgesu ke Dro. Zamenhof proponis sian lingvon nur kiel lingvon helpan, duan apud la lingvo nacia. Al kiu ajn politika partio vi apartenu, lernu Esperanton, donu la preferon al la gepatra lingvo kaj Esperanto, la internacia helplingvo, la lingvo de la estonto, per kiu oni facile komprenos unu la alian, por la bonfarto de vi mem, de la tuta homaro ; por ke regu paco, ĉar certa mi estas, ke neniu el vi ŝatas militon, kiu estas nur fratmortigo sencela. Ni esperantistoj lernis la lingvon, ne laŭ egoisma vidpunkto, sed kun la konscio ke internacia lingvo estas necesa !

La festo kiu fermiĝis per bala sukcesis por la partoprenantoj sed ĉu la festo sukcesis laŭ esperantista vidpunkto mi treege dubas pri tio. Ni esperu ke dum sekvonta festo, oni pli atentos la celon :

« ESPERANTO ».

JEVA.

Ni konstruu !

Via intereso jam estas postulata por multaj asocioj. Tiuj bezonas monon, simpation, laborfortojn kaj kiam vi legas ĉiujn alvokojn kaj komunikaĵojn, tiam, mi konfesas, estos al vi sufiĉe malfacile fari vian elekton. La intenco de tiu-ĉi artikolo estas instigi vian intereson por « Het Vlaamsche Kruis » (Flandra Kruco).

Mi nun donas en konsidero kelkajn informojn pri la celo, klopodo kaj laboro.

Ni ĉiuj ŝatas la amuzon kaj tio necesas. De tempo al tempo necesas fari vojaĝon ; teatraĵojn kaj artesperimojn ni ne povas neatenti ; paroladojn kaj klerigvesperojn ni ne volas manki.

Sed de ĉio ni ne povas plene ĝui, kiam ni ne disponas pri bona sano.

Bona sano ! Tiun-ĉi gardi aŭ akiri, postulas en la plej multaj okazoj nur malgrandajn zorgojn, kiuj tamen en tiu-ĉi jarcento de nerva rapideco, estas neatentataj. Tiun-ĉi gardi aŭ akiri, demandas ofte kuraĝon en tempo, kiu donas pli da valoro al la materio, la riĉeco kaj posedo ol al la homo kaj lia vivo.

Nia tasko devas esti : ŝatigi al nia popolo la sanan vivon, la veran vivon, por ke ankaŭ la infanoj kaj la ĉirkaŭaĵo povu ĝui de ĝi.

Tial nia laboro regas precipe la socian, sed ankaŭ la edukon kaj medicinan teritorion kaj povas nur instigi al interesiĝo de ĉiuj, kiuj estas laborantaj en tiuj medioj. La konsiloj de ĉiuj estas bonvenaj al ni. La simpation kaj laborforton de ĉiuj, ni povas utiligi al ni. En

« Het Vlaamsche Kruis », sociaj laboristoj, flanke de instruistoj kaj kuracistoj, povos porti la popolsanecon en la lando ĝis pli alta nivelo. La atingpunktoj de la diversaj teritorioj estos prilaborataj ĉe ni.

Tiam ni deziras ke la provincano, kiu moviĝas en pli bonaj kondiĉoj ol la urbano, kondiĉe ke li faru kelkajn malgrandajn indulgojn, povu plibonigi sian situacion !

Tiam ni povas atendi, ke ankaŭ nia popolo povos esti iam kontenta pri la laboro kaj institucioj, kiuj jam faris multajn bonajn en aliaj landoj ! Kaj tiam, kiam kelkaj dekmiloj da gemembroj estos aliĝintaj, nur tiam komencos nia laboro, nur tiam ni povos efektivigi niajn dezirojn !

Tiam nia flandra popolo povos sin direkti al siaj propraj institucioj, kiujn ili starigos per propra mono !

Ankaŭ sur nia teritorio devas esti nia devizo : « Ni konstruu ».

Jos. VANDERSTEEN,

Eerste Hulp bij Ongevallen. -- Antwerpen

Diversaĵoj

OOMOTO MALPERMESITA. — La 8-an de decembro policistoj arestis Majstron Onisabro Deguĉi, ĉiujn aliajn membrojn de la Deguĉifamilio kiel ankaŭ la ĉefajn oomotanojn.

La kaŭzo de tiu ago de la aŭtoritatoj estas ankoraŭ ne publikigita.

Oomoto estas nova religia movado en Japanujo, kiu alprenis Esperanton kiel duan lingvon ; ĝi publikigis belaspektan monatan revuon en Esperanto, kiu kredeble nun ne plu povos aperi.

Ni esperu ke nia lingva afero neniel suferos en Japanujo pro tiu-ĉi bedaŭrinda afero.

INTERNACIA KONGRESO. — Eliris la unua numero de « Aŭstria Esperantisto », dediĉita al la Viena kongreso. La unua listo nombras 265 aliĝintojn el 23 landoj. La plej granda kaŭzo de la sukceso verŝajne estas la ĝentila maniero laŭ kiu la invito estas prezentita. La Registaro invitas nin kaj la geesperantistoj ne rezistas al la invito de tia altranga instanco...

TRANSALPA SOSEO. — Grossglockner Hochalpenstrassen A. G. eldonis belege ilustritan faldprospekton pri la plej longa kaj plej moderna transalpa ŝosekonstruaĵo de la nuntempo, mirindaĵo de la aŭstria tekniko. La prospekto montras reliefan desegnaĵon de la montregiono trans kiu kondukas la vojo. Jam la bilda pejzaĵo tuj ravas vin, imagu do kia devas esti la realeco ? Tiujn belajn havos la okazon admiri la partoprenantoj al la kongresa vojaĝo « Tra Aŭstrio ».

NEDERLANDA ESPERANTISTO van 3 Januari 1936, publiceert volgende tekst, welke wij onze leden ter overweging geven :

Zonder uitzondering verder moeten overal de lauwe leden zich eens afvragen of ze nu haast eens — of weer eens — de werkende kern metterdaad bijstand zullen verlenen. Bant uit die laksheid en futloosheid ! Wordt u bewust van het feit, dat gij medebouwers zijt van een der grootste cultuurmonumenten der mensheid.

En gij, cursusleiders, zorgt er voor, dat ook uw leerlingen zich dit bewust worden. Laat de nieuwelingen ook iets anders slikken dan taalwijsheid. Verzuimt niet er bij voortduring op te wijzen, dat

een waar Esperantist op 't gebied van internationaal denken en voelen op hoger plan staat dan de groote massa en daarom zonder zelfoverschatting zich mag beschouwen als een lichtende vuurtoren in de donkere nacht van ras-, partij- en nationaal egoïsme. Mengt daarom, esperanto-onderwijzers, in elke dosis grammatica-deeg een enkel korrel interna-ideo-gist ! Dan oogsten wij in het komende voorjaar niet alleen kwantiteit maar — wat nog veel belangrijker is — kwaliteit. (Nieuwe spelling).

EL BRUSELO. — Antaŭ kelkaj semajnoj venis Bruselon S.ro F. W. Buenting, nederlanda-hinduĵa Ĉseh-instruisto, kun intenco tie vigligi la E-istan movadon. En la diversaj E-kluboj de la urbo li prelegis pri la esperantista movado en Nederlanda Hinduĵoj kaj pritraktis la gramatikajn kaj lingvajn malfacilaĵojn de Esperanto.

Bedaŭrinde, pro tio ke ne ekzistis kunlaborado inter la diversaj grupoj, Buenting estis, malhelpata en sia propaganda laboro. Kun laŭdinda kuraĝo S^o Buenting organizis kunvenojn por la tuta brusela esperantistaro kaj sukcesis decidigi la klubestrarojn al starigo de komisiono kun duobla celo : ĝenerala propagando kaj disvastigo de E^o en Bruselo, kaj interrilatigo de la bruselaj E-grupoj, speciale koncerne komunajn servojn sur E-kampo.

Tiel fondiĝis « *Esperantista Reprezentataro Brusela* ». En tiu komisiono estas reprezentataj la grupoj kies nomoj sekvas laŭ alfabeto ordo : *Cenero*, laborista grupo; *Esperantista Brusela Grupo*, neŭtrala grupo; *Katolika Esperantista Grupo*; *Nia Estas la Estonteco*, flandra grupo; *Nova Vojo*, tramvoĵista grupo. Pro principaj kialoj sin detenis du grupoj.

La Komisiono jam sin okupas pri la propagando en la gazetaro, la propagando en junularaj medioj, kaj la organizado de ĝeneralaj kunvenoj por prelegoj kaj E-festoj.

Kiel sekretario de la Komisiono funkcias S^o F. Swinne, Nieuwenhovestrato, 77, Uklo (Bruselo).

NORDFRANCA FEDERACIA KONGRESO EN HAUTMONT

La 13an-14an de Junio 1936.

La Kongreso de la Esperantista Federacio de Norda Francujo okazos Sabaton kaj Dimanĉon 13an. kaj 14an. de Junio 1936, en Hautmont.

Tiu-ĉi industria urbeto kuŝas ĉe rivero Sambro, proksime al la belga landlimo, kaj la fervojo Parizo — Lieĝo trapasas ĝin (nur la grandaj rapidvagonaroj ne haltas tie).

La kongreskomitato organizos dimanĉe ekskurson en la vera bela regiono juste nomita « Malgranda Norda Svisujo ». Ĉiuj arangoj estos kiel eble plej malmultekostaj por ke ĉiuj povu partopreni ilin.

La normala kongreskotizo estas 10 Francaj frankoj, sed ĝi estos nur 5 fr. ĝis la 31a. de Januaro 1936.

La Nordfrancaj Esperantistoj estos speciale ĝojaj akcepti je tiu okazo, multajn flandrajn samideanojn. Sendu tuj vian aliĝon al S.ro Vavier, 20, rue Aimé Collet — HAUTMONT (Nord) — FRANCUJO. Poŝtĉekkonto Lille-Rijsel : 503.33.

VARBU ABONANTOJN !

Eksperimenta letera kongreso

Al ĉiu Samideano (aŭ Grupo) :

Se vi ne havas la rimedon ĉeesti la jaran mondkongreson, eble, kiel multaj aliaj, vi ŝatus sendi komunikon kiu estus legata ĉe iu kunsido. Tamen, ĝisnun komunikoj ne estas sur la programo (aparte de « Salutoj »). Sed, se la nuna eksperimenta kongreso havus valoran rezulton, kredeble la oficiala Mondkongreso metus « Komunikojn » sur sian programon estonte. Laŭe, vi estas invitata partopreni en « Letera Kongreso », jene :

1. Sendu komunikon al la suba adreso, baldaŭ aŭ almenaŭ antaŭ Julio, 1936.

2. Via komunikado koncernu la lingvan aferon, ekz. : lernmetodon; grupkondukadon, propagandon, respondon al la skeptika demando pri la progreso de la lingvo; aŭ, ĝi estu ideala prelego pri internacia lingvo; ktp, ktp.

3. Kotizo : nenio deviga ; sed laŭvola donaco por helpi al la ne-grandaj elspezoj, kaj ebligi premiojn por la plej ŝatindaj komunikoj, danke riceviĝus.

Adreso : Esperanto-Info, 50, Congress St., Boston, U. S. A.

Momenton ni ridu !

KONTRAŬ LA CIMOJ.

Du Valonoj trinkis glason da biero en Brusela kafejo, sed ili trovis la prezon de la biero iomete tro alta : Tri frankojn la glaso!

Dum kiam la estro venis por aranĝi la pagon, unu el la kamparanoj rimarkis grandan cimono sur la tablo.

— « Ĉu oni devas ankaŭ pagi por tiu-ĉi besteto ? » li ŝerce demandis.

— « Ha ! sinjoro, ne parolu al mi pri tio ! » respondis la estro. « Ili vere abundas tie-ĉi. Ne estas eble forigi ilin ».

— « Mi konas taŭgan rimedon kontraŭ la cimonoj », diris la provincano. Se vi bonvolas lasi senpage la bieron al ni, mi al vi diros kompencon mian rimedon. »

— « Akceptite! mia amiko, akceptite! »

« Jen! Vespere, vi bone fermu la ĉambron okupatan de la cimonoj, vi ekbruligu lampojn kaj vi metu ĝin en la mezon de la ĉambro, sur grandan blankan paperon. La cimonoj, allogataj de la lumo kaj de la rebrilo de la papero, tuj alrapidigos en densaj vicoj, kaj ili amasiĝos ĉirkaŭ la lampo. »

— « Nu, poste? »

— « Poste, vi iru en la ĉambron kun pleto ŝargita je glasoj da biero kaj vi ekkriu: « Tri frankojn la glaso! » kaj la cimonoj faros kiel ni: ili tuj forkuros kaj neniam plu revenos. »

* * *

Distraĵoj en la kamparo, en la tempo, kiam ne jam ekzistis la radio :

— Nun, ni iros nombri la pirojn; sekve, ni iros por vidi la rapidvagonaron, kiu pasas je la 4a29.

SUBTENŬ POR LA REVUO

G. Debrouwere, 5,— fr.

POR NIA SKRIBMASINO

Jef, 5 fr.; Jos, 5 fr.; Rene Maria, 5 fr.; Ward, 5 fr.; Aĥilo, 5 fr.;
Jul, 0,50 fr.; Mil de volkszanger, 0,50 fr.; Rapideco, 1 fr.; Piet, 5 fr.

Grupa Vivo

AALST : LA PIONIRO.

La sekretariino antaŭlegis la raporton de la pasinta jaro. Ĝi estas sufiĉe kontentiga.

La kasistino raportis pri la stato de nia kaso, kiu estas en bona ordo ; kun tia kasistino ni certe ne ruinigos.

La bibliotekistino parolis pri la enhavo de la biblioteko. Ni fine rehavas niajn librojn.

S.ro Eeckhout parolis pri Esp. kurso, kiun li intencas gvidi en apuda vilaĝo.

Poste ni ankoraŭ iomete ludis per esperantaj kartoj.

ANTWERPEN : FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Nia Kristnaskfesto okazis la 25an. de Decembro en la festsalonego « Kathedraal ». Estis la unua fojo ke nia Kristnaskfesto okazis en tiu-ĉi ejo kaj la rezultato pruvis ke ni bone agis ŝangante de salonego, ĉar estis la festo la plej brila ĝis nun konata en la grupo. La geamikoj kaj gesimpatiantoj de la grupo ĉeestis multnombre kaj la alloga salonego estis plenplena, ne unu seĝo restis neokupita.

La programo estis tre prizorgita, tiel por la geetuloj kiel por la plenkreskintoj, precipe dank' al diversaj gemembroj kiuj vere sindone oferis sin la lastajn semajnojn por trovi bonajn kaj agrablajn artistojn kaj artistetojn.

Inter du partoj de la programo okazis por la infanoj senpaga lotumado, kiu havis, juĝita laŭ la granda nombro da partoprenantoj, multan sukceson. Post la dua parto okazis la disdonado de la multaj alvenintaj donacoj por la geanoj kaj geamikoj de la grupo. La nombro de donacoj pligrandiĝas ĉiun jaron kaj pruvis ke niaj geanoj tre amike interrilatas.

Por la lotumado ni havis multan intereson, tio estis eble precipe pro la biciklo, kiu troviĝis inter la diversaj premioj. Tiu durada, per-la-piedoj-movigata-veturilo, estas la vera idealo por la geesperantistoj : bonega konstruo, esperanta nomo « La Rapideco » insigno kun verda stelo kaj liverita de S.ro F. Kennes, honormembro de nia grupo.

La balo nur komencis je noktmezo, je granda bedaŭro de la juna elemento. Dum tiuj-ĉi lastaj horoj de nia festo, ĉiuj ĉeestantoj sin ankoraŭ bonege amuzis, ĉar la konata Antverpena gajeco regis, kaj perfekta jashando aŭdigis viglajn arietojn. Kiel kutime, oni nur kontraŭvole reiris hejmen je la dua.

Kaj nun, post la plezuro, denove al la laboro por nia grupo kaj nia idealo ! Kun nia fervora prezidanto J. Genar ni estas certaj ke niaj idealoj efektivigos en la estonteco.

Vidu pliajn detalojn en la artikolo « Fakto pripensinda ».

BRUSSEL : N. E. L. E.

Nia Ĉseh-kurso logis 35 lernantojn kiuj nun diligente lernas, laŭ tiu agrabla metodo, nian karan lingvon.

La grupo regule kunvenas ĉiumarde je la 20-a. Dum ĉiu kunveno, de la 20-a horo ĝis la 21-a, estas pritraktataj la kutimajn grupaferojn (t. e. protokolo, komuniko de la ricevitaj kaj forsenditaj korespondadoj, diversajoj) poste, de la 21-a ĝis la 22-a, sekvas la perfektiga aŭ distra horeto laŭ starigita programo. Jen sekvas la programo por la monato Februaro :

Mardon la 4-an : Tradukvespero.

Mardon la 11-an : Kantvespero.

Mardon la 18-an : Perfektiga ekzerco (akt. participoj anta, inta, onta).

Mardon la 25-an : Legvespero (ĉiu kunportu la lastaperintan F. E.).

Ĉiu regule ĉeestu niajn kunvenojn. Oni ne forgesu ke baldaŭ ni havas delikatan taskon por plenumi : kapti la novulojn por nia movado !

MECHELEN : LA ESTONTO.

La 20-an de Decembro okazis ĉi tie la provleciono de la Ĉseh-kurso, donata de la Rumana samideano Sinjoro Ornstein.

Tiu leciono estis vera sukceso. Dudeko el la ĉeestantoj tuj enskribis sin. Ni scias ke kompare al najbaraj landoj, la rezultato ŝajnas malgranda, sed ni ne forgesu ke la Ĉseh-metodo ne ankoraŭ estas konata tie-ĉi. Certa estas ke ĝi tre plaĉis ankaŭ al la scivolemaj samideanoj, kiuj simpatie ĉeestis, kaj la novaj lernantoj entuziasmiĝis pri sia eta kono de la internacia lingvo, ĉar vere ili jam bone komprenis la finvortojn de la instruisto. Sed certe al siaj familianoj kaj amikoj ili jam almontris « ke azeno ne estas meblo, sed... besto ! » Kaj de la unua momento ili interkonatiĝis kun la « Verda Kato » besteto, tre ŝatata en Esperantujo, ĉu ne ?

Ni do esperas je belaj fruktoj ! Kaj tre dankas sinjoron Ornstein kaj sinjoron prezidanton Rainson, pro lia bela kaj kuraĝa iniciato.

KORTRIJK. — Kiel daton por sia jara festo, la grupo elektis la 16-an de Februaro. Laŭ bona kutimo, ĉiuj gesamideanoj el la okcidenta angulo de Flandrujo kaj de norda Francujo, renkontiĝos tiun daton en la ejo « De Tuin », Yzerweglaan, Kortrijk, je la 3-a posttagmeze.

RONSE : LA PACA STELO.

Tiun-ĉi monaton ni havas por niaj kunvenoj 3 merkredojn, kiuj enhavas : Kantvesperon, Tradukadon de la verko : La Filosofo de Haagem kaj fine antaŭlegadon de iuj esperantistaj versaĵoj.

Nia grupo kaptis jam kelkajn partoprenontojn al nia kongreso, kiuj kompreneble jam... pagis la kotizaĵon.

Nia biblioteko pliriĉiĝis per deko da libroj de plej diversaj aŭtoroj.

Proksiman monaton oni pridiskutos ĉi-tie programon por la estontaj ekskursoj kiuj ekkomencos ek de Aprilo, kiam la vetero taŭgos.

Al pli grava kaj daŭra laboro, ni restas fidelaj al nia nobla kaj paca movado.


La angulo de la sercemuloj

Al la ensendinto de la plej bonaj solvoj, ni promesas belan premion. Ĉiu solvita vorto valoras por 1 poento. Le premio estos do por tiu, kiu akiros la plej altan nombron da trovitaj vortoj.

La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Marto rekte al S.ro F. Volders — Bredastraat 94 — Antwerpen. Bonan ŝancon!

PROBLEMO 2 : Krucvortenigmo.

(La litero « R » post la klariga vorto signifas, ke oni prenu nur la radikon de la demandata vorto).



HORIZONTALE :

1. — Belga urbo — anagramo de dam.
2. — Virina manlaboro (R) — veturilo (R).
3. — Plej alta — insekto (R).
4. — Nomo de Esperanta asocio.
5. — Al paco (mall.) — Adj. numeralo ord. — Pers. pron.
6. — Metalo (R.) — numeralo.
7. — Pintigi (R).
8. — Membro (R). — R. I.
9. — Verba finiĝo. — fluidaĵo (R). — Pers. pronomo.
10. — Idealisto (R). — 11. — Tre amiĝo (R) — Kiu portas la teron (R). — 12. — Korpa difekto (R) — Iutempa. — 13. — Montra pron. — Pagilo (R).

VERTIKALE :

1. — Anagr. de BAS — Sufikso. — 2. — Planto (R) — Ne amuzi sin. — 3. — Flandra ekkrio infana — Ĉiela korpo. — 4. — Ŝtofo — Serpento (R). — Membro (R) — Amfibio (R) — Sufikso. — 6. — Muziknoto — Metalo (R). — 7. — Venecia kantado. — 8. — Duobla vokalo — Prepozicio. — 9. — Prepozicio — Fable hommanganto — T. A. — 10. — Malsekigi la gorĝon (R) — Sekvi ekzemplon. — 11. — Senkotigi riveron — Religio (R). — 12. — Korpa parto — Anagr. de mato. — 13. — Kore — Korpa bonfarto (R).

N. B. — *Sendu tuj vian aliĝon al la :*

7a FLANDRA KONGRESO EN GENT !

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.

Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.

Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.

Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.

Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.

Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

- Aalst:** « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Grootte Markt; vergaderingen elken Woensdag avond.
- Aarschot:** « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
- Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
- « La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
- Brugge:** « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
- Brussei:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elken Dinsdag avond.
- Edegem:** « Nia Idealo », Verbindingsstraat, 9.
- Hamme:** « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
- Kortrijk:** « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
- Lede:** « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
- Leuven:** « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
- Lichtervelde:** Sekretariaat, Weststraat, 47.
- Mechelen:** « La Estonto », vergadering elken Vrijdag te 20 uur, Hombeeksche steenweg, 54.
- Oostende:** « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
- Oudenaarde:** « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
- Roeselare:** « Ruselara Grupo Esperantista »; Statiedreef, 177.
- St. Niklaas:** « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

- Diksmuide:** M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
- Gent:** Juliette Terriijn, Raapstraat, 82.
- Harelbeke:** A. Doornaert, Stasegemstraat.
- Hoboken:** J. de Groot Caronstraat, 31.
- Meenen:** K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
- Millen (Tongeren):** L. Geukens, Langstraat.
- Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.
- Ronse:** « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
- Thielt:** R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.
- Wilrijk:** Daniel Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.
-
-

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Varbu Abonantojn kaj Anoncantojn !

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafsplaats, 3 — GENT — Tel. : 120.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la

7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO

Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.